# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

9a jarkolekto n-ro 6
junio 1989

## Estraro

Monique Caestecker, prezidanto, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, ☎ (091) 57 63 84.

Edward Symoens, vicprezidanto, Putsesteenweg 131A, 2180 Kalmthout, ☎ (03) 666 62 66.

Ivo Durwael, sekretario, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, ☎ (03) 440 30 92.

Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, ☎ (050) 33 00 04.

Alex Humet, instruado, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, ☎ (03) 239 21 69.

Jos Vandebergh, eksteraj rilatoj, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, ☎ (011) 52 19 43.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldonoj:* Alex Humet, Paul Peeraerts kaj Chris Declerck (Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen)

*Manlibro de la aktivulo:* Marc vanden Bempt (Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, ☎ (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme (FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, ☎ (03) 234 34 00).

*Rebata servo:* Germain Pirlot (Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, ☎ (059) 70 87 00).

*Turisma servo:* Ivona Kosięba, Gen. Drubbelstraat 105, 2600 Antwerpen, ☎ (03) 218 63 76.

PROTOKOLO DE LA FEL-ESTRARKUNSIDO DE 11/6/89

Ĉeestis: Edward Symoens (ES), Ivo Durwael (ID), Roland Rotsaert (RR), Jos Vandebergh (JV) kaj (parte) Paul Peeraerts (PP).
Monique Caestecker (MC) forrestis pro malsano.

1. Antaŭaj protokoloj(15/4 kaj 20/5):
Enhave aprobitaj. Ni strebu al finredaktado de ĉiu raporto per 1 persono. La raporto pri kluba agado aspektas konfuziga por tiu, kiu ne partoprenis ĝin.
Kontraŭe al antaŭa decido, ni petas al la centro sendi almenaŭ 1 organigramon al ĉiu klubo, ankaŭ se ili ne petas ĝin.

2. Financoj: la financa komisiono raportas ke la spezokonto de aprilo montras pli favoran bildon ol pasintjare. Tio tamen ne signifas ke ni jam certas ke deficito forrestos. Ni bezonas ankoraŭ pliajn klientojn por grafikaj laboroj. Gerd Jacques, PP kaj ID nun sekvas TELEAC-kurson pri financa entreprengvidado. Kune kun RR kaj MC ili kunvenos je 2/7 dum tuta tago por pristudi eblecojn de aplikado en FEL.

3. Rilatoj BEF + APE: estiĝas pli kaj pli intensa kunlaboro. Ni strebos i.a. al unuecigo de la kotizoj de APE kaj FEL.

4. Agadplano de FEL:
a) ESPERANTO PROGRAMITA: ID proponas kampanjon por perpoŝte vendi la kurslibrojn ("mailing"), kun laŭebla subteno de komunikiloj, per eluzo de la argumento ke studo de planlingvo plirapidigas la studadon de aliaj fremdlingvoj.
Argumentoj:
- ni disponas pri amaso da kurslibroj;
- ni disponas pri materialo por senpaga provo;
- ni povas mem presi materialon, kiu mankas;
- pli kaj pli da asocioj uzas tiun rimedon;
- ni neglektis ĝis nun emfazi samtempe la lingvajn kaj la kontakteblecojn (kp studotago);
- ni difinis niajn celgrupojn;
- ni jam decidis eluzi la eŭropan aktualecon;
- ĉio pri studado de fremdlingvoj furoras nuntempe.

RR dubas pri la financa rezulto. Jam nur la afranko povus konsumi grandan sumon. Li proponas anstataŭe vendi niajn kurslibrojn je kostoprezo, sed neniom elspezi por kampanjo.
ES proponas eluzi la senpagajn vojojn: artikoloj en revuoj de instrumedioj (VVL, Informatieblad ktp)
La estraro ne kontraŭas la ideon. Tamen ID provu ĝis la 2a de julio plikonkretigi la planon kaj aldoni taksojn de ev. kostoj. ID proponas ne prokrasti ev. efektivigon ĝis la vintro, ĉar homoj plej ofte decidas en la ferio pri lingvokursoj kaj gazetaro pli malfermiĝas.
b) EKOLOGIO/NEŬTRALECO DE FEL:
ID defendas la ideon pri aktiva neŭtraleco: t.e. ke ni ne okupiĝu pri problemoj, kiuj dividas la homojn, sed ke ni jes rajtas plendi kontraŭ perforto de ĝenerale akceptitaj principoj. Same kiel UEA subskribas la Homajn Rajtojn, ĝi povus subteni la Protekton de la Vivo (ekologio). El la diskuto evidentiĝas malakordo pri ekologia punkto en la statutoj. Tial ni rezignas pri plua diskuto. ES proponas ke interesataj Esperantistoj grupiĝu en fakgrupon.

c) INFORMA MATERIALO POR NIAJ KLUBOJ:
Pro nia financa situacio, FEL certe nun ne povas fari pliajn donacojn al la kluboj. Tamen, la estaro decidas disponigi informan materialon el la ekzistanta stoko je duona prezo. Tiu propono do nur validas ĝis elĉerpiĝo de la stoko!

| | |
|---|---|
| AFIŜOJ "Esperanto, laat je verleiden": | 400 fr/100 |
| FALDFOLIOJ "E", tweede taal...": | 50 fr/100 |
| "E", wat is dat?": | 100 fr/100 |
| GLUETIKEDOJ grandaj: | 30 fr/10 |
| SKRIBILOJ: | 40 fr/10 |
| E° DOKUMENTOJ: | 1000 fr/10 serioj=50kaj. |

ES insistas ke la kursgvidantoj informu la lernantojn pri la enhavo de la E° dokumentoj kaj komuniku novajn demandojn pri E° al la estraro.

d) EUROPA ESPERANTO-CENTRO: je iu momento estiĝis la ideo por refondi EEC-n en la E' domo en Antwerpen. ES eksciis ke Grégoire Maertens nun okupiĝas pri refondo de la centro kaj opinias ke ĝi nepre estu en Bruselo. RR opinias ke multaj asocioj ŝatus havi sidejon en Bruselo, sed ne povas pagi ĝin. Tial la posedo de domo samtempe por E' kaj subluebla por aliaj asocioj povus esti avantaĝo.

e) ESPEUROP: la iniciato ĝuas multe da simpatio de la estraro. Sed JV rimarkigas ke sur la nederlandlingva enketilo troviĝas telefonnumero por pliaj informoj de S-ro Dumortier, kiu parolas nek la nederlandan, nek Esperanton. FEL subtenos la iniciaton nur kiam tiu eraro estos forigita. ID kontaktos Emile Van Damme pri tio kaj petos ankaŭ adreslistojn de nederlandlingvaj informpetintoj.

4. Domstilo: La estraro insistas ke en la libroservo oni ne plu eksponiciu "diversaĵojn" kun steloj. Ni ne povas malpermesi la portadon kaj aĉetadon de steloj, sed la steloj estu aĉeteblaj nur post peto. Kiam internacie oni pli kaj pli uzas la jubilean simbolon, FEL certe devas persisti.

5. Diversaĵoj:

a) CINIO 1: S-ro Wylleman proponas sendi leteron de simpatio al la ĉinaj studentoj en Belgio. Akceptita.

b) CINIO 2: RR verkis leteron por la entreprenoj kun komercaj rilatoj en Ĉinio proponante vekon de simpatio en Ĉinio pere de anoncoj en E' revuoj. Aprobite, sed post konsulto de PP pri praktikaj eblecoj.

c) INFORMA KASEDO: Walter Van de Kieboom iam proponis fari kasedon de plej bonaj radio-elsendoj, por povi transdoni ĝin al interesaj personoj, kun la peto aŭskulti tion dum veturado. Mankas ankoraŭ persono, kiu volas okupiĝi pri tio. Kiu povas doni konsilon al RR?

d) PRELEGOJ: JV petas ke ni trovu homon, kiu povas prelegi en ĉiuj kluboj pri la estonta UK. Oni eĉ povus instrui prelegon al novulo.
Li ankaŭ petas reaktualigi la liston de la prelegantoj el la Manlibro por Aktivuloj. Ĉu iu pretas okupiĝi pri tio?

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

## STUDOTAGO PRI KLUBAJ AKTIVECOJ.

Pro eraro de la sekretario, zorge pripensita propono de Germain Pirlot estis forgesita. Ĉi-sube ni publikigas la proponon, kiu certe meritas vian plenan atenton.





KION FARI POR VIGLIGI KLUBAN VIVON?

ĉu preĝi ?
ĉu teoriumi ?
ĉu agadi ?
ĉu ... ?

KONSTATO

Kroz kelkaj esceptoj, E-klubo estas strukturita kiel izolita ĉelo, kvazaŭ kiel geto, kun preskaŭ neniuj rilatoj kun la ĉirkaŭaĵo. Temas pri *centripeta strukturo* kiu estas la kutima organizo de loka E-klubo, t.e. ĉelo, kiu strebas enirigi ĉiujn membrojn en saman zedion kun komunaj aktivaĵoj.

Centripeta strukturo :





Sekve novbakita E-isto havas nur du solvojn :
- ĉu konsenti pri tiu rigida formulo kaj eniri;
- ĉu forlasi kaj la klubon, kaj tre ofte ankaŭ la E-movadon.

SOLVO !?

Pli kaj pli ni klopodu starigi *centrifugan strukturon* kiu, kiel polpo, strebas eniri en la plej diversajn mediojn, kaj kies membroj mem proponas kaj prizorgas aktivaĵojn. Sufiĉas du, tri homoj por roli kiel faka E-grupo kiu, laŭeble, kunlaboru kun loke samfaka grupo neesperantista. Laŭ tia strukturo eblas pli facile kaj pli efike integriĝi en la lokan/regionan socion.

Centrifuga strukturo :




loka E-fakgrupeto, kies nur parto de la membroj estas anoj de la loka E-grupo;

neesperantista fakasocio, kies nur parto de la membraro estas anoj de E-fakgrupo.

FUNKCIADO

- ĉefcelo estu aplikado de Eo laŭ propraj interesoj;
- tiu agado komenciĝu post elementa (unujara) lernado de Eo por havi bazan gramatikon;
- ĉiu agado okazu nur en Eo por pliriĉigi la vortaron kaj plifirmigi la gramatikon;
- la klubanoj ariĝu laŭ propraj interesoj : filatelio, birdoj, poezio, paco, matematiko, ktp.;

  rim.: grupeto povus esti unuhoma.
- ĉiu grupeto :
  - arigas dokumentojn (librojn, artikolojn, bultenojn) laŭ la elektita temo;
  - klopodas havi kontaktojn kun loka asocio, kiu havas la samajn interesojn;
  - informas ĝin pri faka agado en Eo (konferenco, seminario);
  - tradukas tekstojn el Eo por proponi ilin al nacilingva bulteno;
  - tradukas artikolojn el nacia lingvo en Eon por proponi ilin al E-gazeto;
- monate, ekzemple, la grupetojn havas komunan kunvenon en la klubejo por prepari tekstojn, peti informojn, konsilojn de la instruanto (aŭ de E-spertulo);

  rim.: intertempe ĉiu grupo laboras sendepende;
- regule estu aparta kunveno en la klubejo por diskonigi al aliaj grupoj la faritan laboron, interŝanĝi spertojn, ktp.;
- laŭeble ĉu grupo mallonge, sed regule, raportu pri sia agado en E-bulteno;
- nepre, tiuj grupoj klopodu havi kontaktojn kun samfakuloj el aliaj urboj kaj landoj.

KONKLUDO

Pripensu tiun sugeston kaj spertu ĝin antaŭ ol malaprobi ĝin !!!

**Estrarkunsido de FLEJA je 27/05/89 ĉe Patrick Haerick en Wondelgem**

ĉeestantoj: An Alberto, Patrick Haerick, André Ruysschaert, Eddy Van den Bosch kaj Jean Pierre VandenDaele.

Komenco: 11h15.

1. Enkonduke

Unue la antaŭa protokolo estis akceptita. La konsisto de nia estraro troviĝas en la organigramo de 1989 (havebla de FEL). Koncernaj estraranoj jam ricevis ekzempleron.

2. Financoj (Eddy kaj André)

2.1 elspezoj:

Trarigardinte kaj petinte pli da klarigoj pri la elspezoj de la antaŭa jaro ni decidis klopodi malpligrandigi la elspezojn por administraj kostoj kaj la kostoprezo de JEN (pres- kaj ekspedkostoj) kaj Koncize (Jean Pierre esploros la kostoprezan diferencon por la kvantoj de 25 kaj 50 ekzempleroj).

2.2 enspezoj:

la subtenanta kategorio "d" plialtiĝos al 1000 frankoj kun ebleco de subtraho imposta.

Pro malbona situo de nia budo dum la Gambrinus-festoj en Loveno ni apenaŭ povas enspezi la elspezojn.

Daŭre la mono de germanaj aliĝintoj en antaŭa FLEJA-semajnfino ne alvenis (ordigenda dum IJK), sed jes la subvencio de la Flandra Komunumo (15000 BF). Same ne de Zagrebo por la tri interŝanĝintaj partoprenantoj. Jean Pierre petos al An telefoni al IKS-Zagrebo.

3. IJK-Kerkrade

interesiĝa letero (de Heidi) alvenis por la belga vespero dum la IJK. Ideoj jam esprimiĝas sed ne necesas speciale kunveni, ĝia efektiviĝo povos okazi surloke. Inter la 500 da aliĝintoj estas 15 belgoj. André proponas por inviti la gazetaro, proksimaj radioj kaj BRT/VTM por nia bicikla karavano al Oostende.

4. Interkongresa semajno

4.1: bicikla karavano al UK-Brighton (Eddy)

jam tre bone progresas: tranokti eblos en ĉaleto en Kelchterhoef, en Bazel kie povos esti uzataj la sanitaraj instalaĵoj de la sportejo tiea kaj en Damme (ĉe Maertens).

La itinero aspektas jene: Kerkrade-Houthalen (tranokto) - Bazel (tranoktado kaj ripoztago en Antverpeno) - Lokeren (kongresejo) - Moerbeke - Zelzate - Damme (tranoktado) - Bruĝo (urba vizito) - Oostende (per nokta pramo al Britio).

4.2: JEVA-ripozsemajno:

ĝi okazos en Welkenraedt kun loĝado en grandaj tendoj proksime al la sportejo. Aliĝkotizo estas 2500 frankoj.

5. 12a semajnfino en Lokeren (Eddy)

Eddy petas starigi kunordiga teamo al kiu aliĝas An kaj loka persono el Lokeren (Erik Vervaet?)

Panmanĝaĵoj diversspecaj laŭfranca, angla kaj nederlanda (surloke aranĝitaj). Programa preparado: vesperaj progamoj ne jam estas fiksitaj. Dumtagaj: prelego de Angelos pri Eŭropo, vizito al naturrezervejo Molsbroek (sub nederlandlingva gvidanto), al la centro de Lokeren aŭ bicikla ekskurso. Fruvespere: infanoj de Lokeren proklamos poemetojn. Popoldancado. Dimanĉmatene trinka akcepto okaze de 10jara ekzisto de FLEJA.

Aliĝiloj haveblas ĉe Eddy kaj estos disdonataj dum la IJK.

6. Diversaĵoj

6.1 "Gordelen": ni promene partoprenos en tiu ĉi aranĝo ĉirkaŭ la urbo de Bruselo la 3an de septembro.
6.2 Pasporta Servo: pri la eldonado de novaj faldfolioj ne jam alvenis pliaj informoj de NEJ. Cele al mencio en Interrail ni komponos tekston pri Pasporta Servo en la nederlanda kaj franca (por VEJA) kiun ni sendos al Interrail kune kun alilingvaj mencioj jam aperintaj eksterlande.
6.3 leterpapero: ni decidis presigi 1000 foliojn de nia leterpapero kun la necesaj adaptiĝoj laŭ la domstilo de FEL.
6.4 Venonta estrarkunsido okazos dum nia semajnfino.

Fino: 13h15. Protokolanto: Jean Pierre VandenDaele.

## ALVOKO

### al grupestroj kaj kursgvidantoj

En septembro komenciĝas nova lerneja jaroj. Por varbi kursanojn kaj prezenti al eblaj interesatoj plej kompletan liston da kursoj, ni urĝe petas vin sendi detalajn informojn (dato, loko, horo, komenca leciono, prezo, instruisto...) pri la kursoj, kiujn vi organizos al *Esperanto Panorama* antaŭ la fino de julio. Tiel en la septembra numero de nia revueto povos aperi taŭgaj kaj aktualaj informoj pri la kursoj okazontaj en Flandrujo.

Koran dankon!

**Informi interesatojn estas duono de la varbad-laboro!**